

TEA-BULTENO

20^A JARO - N^o 144

JULIO - AŬGUSTO

N. 7-8/2018

Vivo ne estas tiu kiun oni estis vivinta, sed tiu kiun oni memoras kaj kiel oni ĝin memoras ĝin rakontante.
Gabriel García Márquez, Nobel-premiito pri Literaturo (1927-2014)

Karaj Gelegantoj!

Finfine somero! Tempo de libertempo, tempo por ne pensi pri ĉiutaga streĉiga laboro, por kalkuli trankvile kaj malnervoze la tempon de pensiĝo (en la tago de Sankta Neniamo?!?), tempo fine por iom pli dediĉiĝi al la familio kaj al si mem, kaj tempo por ioma esperantumado en la eventoplena Esperantujo.

Sufiĉas trarigardi en retejo por malkovri, ke ĉie, ĉie ajn, okazas io ĝuinda en nia verda mondo. Certe jam multaj estas kiuj profitis eĉ antaŭsomere de la abundo da verdaj okazaĵoj. Verdire ankaŭ mi estas inter tiuj "multaj". Tre interesan aranĝon mi partoprenis en la dua semajnfino de junio, nome la 20^{an} Konferencon de esperantistoj de Alp-Adrio, okazinta en Bjelovar, Kroatio. Ĉio estis dense kunigita en tri tagoj, sed neniu plendis, ĉar la tuto estis tiom glate, senstumble, brile, entute perfekte organizita, ke oni ne laciĝis.

Ĉeestis la konferencon pli ol 80 personoj el Aŭstrio, Bosnio kaj Hercegovino, Hungario, Kroatio kaj Slovenio. Interkona vespero, prelegoj, seriozaĵoj kaj amuzaĵoj, marŝado kaj dancado, eĉ plantado de ARBO DE INTERNACIA AMIKECO: nenia ingredienco mankis en tiu bongusta koktelo! Nu, dankon al la organiza teamo kaj precipe al Josip Pleadin, pro la sukcesa konferenco.

Tiu aranĝo apartenas jam al la estinteco; ni vidu tion, kio povas esti pli alloga por interesa esperantumado. Nu, kompreneble la UK en Lisbono, la unua el la tuta E-historio okazonta

en Portugalio! Certe ĝi estos neforgesebla: mi atentos vin jam sabaton la 28^{an} de julio, ekde la 19^a horo, en la kongresejo por la Movada Foiro!

Kaj post la UK, mi invitas vin al Respubliko San-Marino, de la 18^a ĝis la 25^a de aŭgusto por la 85^a Itala Kongreso

Dum la plej internacia nacia kongreso, estos traktata la jena temo:

San Marino kaj Esperanto: Malgrandaj komunumoj kaj grandaj valoroj

Elstaraj estos la prelegantoj, nur kelkajn mi citos: Davide Astori, Emmanuele Regano, Humphrey Tonkin, Amri Wandel...

Eminentaj la diversgradaj kursoj, de Anna Löwenstein, Dalia Pileckiene, Rafael Mateos.

Entuziasmigaj la koncertoj kaj la teatraĵo.

Eksterordinaraj la ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo: al Faenza, Urbino, Gradara, Cesena kaj ankorau multaj aliaj...

Sed nepre oni ne devas malĉeesti en la programero de **vendredo la 27^a de julio, je la 16^a horo en salono Ciccanti** (bv. noti ĉiujn ĉi detalojn jam nun, por ke vi ne maltrafu la gravan programeron!).

PRESENTADO DE LA ITALA KONGRESO 2019 (ORGANIZA KOMITATO TRIESTE)

Jes, venontjare en Triesto okazos la 86^a Itala Kongreso de Esperanto, de la 25^a ĝis la 31^a de aŭgusto 2019. Bonvolu jam nun noti ĉi daton en via kalendaro kaj prepariĝu por eksterordinara kongreso kaj mirinda urbo: TRIESTO INTERKARSTO KAJ MARO. **Kore, la redaktanto**

TRADUKKONKURSO "LUCIJA BORČIĆ"

Honore al Lucija Borčić (26.07.1921-14.11.2015) Kroata Esperantista Unuiĝo pasintjare lanĉis literaturan traduk-konkurson de iu ajn nacia lingvo al Esperanto. La konkursaj branĉoj estas jenaj:

· poezio: maksimuma longo ne fiksita

· prozo: rakonto aŭ novelo: maksimuma longo 30.000 tajperoj (kun spacoj)

La rezultojn oni publike anoncos la 14^{an} de novembro en Zagrebo, dum la memorkunveno al Lucija Borčić. Estos disdonitaj po 3 premioj branĉe. La aliro al la konkurso estas libera al ĉiu Esperantisto, kiu rajtas partopreni per maksimume tri konkursaĵoj/verkoj, antaŭe ne publikigitaj, ĉu en presa, reta, bloga, fejsbuka formoj. Nepre aldonendas jenaj informoj: nomo kaj familia nomo, poŝta adreso, retadreso de la konkursanto; titolo de la originalo, nomo kaj familia nomo kaj la bazaj datumoj de la aŭtoro de la tradukita verko. **La tradukaĵojn kune kun la originalaj tekstoj kaj aldonaj informoj oni sendu al la retadreso: hes@hes-keu.hr ĝis la 14^a de septembro 2018.** La premioj konsistas el diplomo kaj libro. La organizantoj de la konkurso prizorgos la presadon de la premiitaj tradukoj konforme al la reguloj preskribitaj por tiu agado (respekto de aŭtoraj rajtoj ktp). **www.hes-keu.hr**



Projekto "Koni Trieston"

La domo de la geedzoj

Bonfaranto el la 19^a jarcento

Modestas la malnova domo, griza, severa, nur du-etaĝa: ĝin mi tre bone konas, ĉar - ekde la 1940^{aj} jaroj - mia familio loĝis en la vid-alvida, pli alta palaco, de strato *Fabio Severo 80*. Mia patrino, kiam mi estis iom pli aĝa, rakontis ĝian historion, kiu al mi ŝajnis tre romantika novelo.

Ĝia oficiala nomo estas: "La Domo de la Geedzoj". Ĝi estis konstruita danke al bonfara iniciato de barono *Ambrogio [Àmbroĝjo] di Stefano Ralli* (1798-1886), rara ekzemplo de grandanimeco.

Lia familio devenis el la insulo *Chios* [Kios], Grekio, en la orienta Egea maro. Dum la 19^a jc ĝi akumulis imponajn riĉaĵojn danke al ŝipkomercado kaj banka kaj asekura kompanioj. Familio Ralli estis konsiderata unu el la plej riĉaj de Triesto. *Ambrogio Ralli* estis malavara mecenato, helpanto de la plej malriĉa parto de la loĝantaro: li fondis institutojn por la malriĉaj oficistoj kaj edukejojn por malriĉaj knabinoj, iniciatis fonduson por la nekuraceblaj infanoj de la Triesta Pediatra Malsanulejo k.a.

Sed ni revenu al la geedza domo: lia intenco estis tie gastigi la junajn parojn en mizeraj kondiĉoj, dum iu difinita periodo, nome ĝis la pliboniĝo de ilia financa situacio. Kiaj estis la reguloj? Laŭstatute la paroj devis havi nedubeban moralecon, esti sanaj, havi laborpostenon garantiantan la subtenadon de la familio, ne havi pli ol 35 jarojn, la viro, kaj ne pli ol 25, la edzino. La loĝejoj, konsistantaj el ĉambro kaj kuirejo, jam estis meblitaj. La paro rajtis tie loĝi dum du jaroj senpage, dum tri se intertempe naskiĝis filo(j). Interese estas, ke neniam estis antaŭviditaj renovigoj de la konstruaĵoj, sed tamen, laŭ la tempopaso, la akvon oni ne plu devis ĉerpi el putro, gaso kaj elektra kurento estis instalitaj por pli komfort-



igi la loĝadon. Rezistis dum certa periodo tre severa regulo: la domanoj devis rehejmiĝi ne pli malfrue ol la 22^{an} horon.

La domo estis inaŭgurita maje 1864; informoj pri tiu ĉi iniciato atingis ankaŭ eksterlandon kaj multaj laŭdoj pri tio estis esprimitaj en diversaj ĵurnaloj, kiuj emfazis la gravecon de tia ekzemplodona agado.

Ĝis kiam funkciis tiu sistemo? Ĉio finiĝis post 90 jaroj: en 1954 pranepo de la bonfaranta familio cedis la respektivajn loĝejojn al la lastaj "gastoj" kontraŭ la sumo de 400.000 liroj, kaj tiamaniere ĉiu el ili fariĝis kunposedanto. Ion pri la domo: konstruigis ĝin, ekde 1863, arkitekto Giuseppe [Ĝuzepe] Baldini, grekistilo. La fasado estas kovrita per du diverskvalitaj ŝtonoj, alterne blankaj kaj grizaj; ĉirkaŭ la pordego kaj fenestroj videblas tre severaj dekoracioj. Ĝi havas du etaĝojn, en la antaŭa parto, apud la ĉefa vojo, dum en la malantaŭa estis faritaj du kromaj etaĝoj, rigarde al suba kamparo kaj havantaj helikoforman ŝtuparon. En la timpano de la enireja pordo estas skribitaj la jenaj vortoj, en greka kaj latina tiparoj: PASTAS. Kion tio signifas, envere mi ne scias.

Kortuŝaj estas la grekaj versaĵoj aperantaj sur la ŝtona memorŝildo en la teretaĝa halo:

Mi deziras, ke nasku nun la arbeta altajn foliarojn kaj florojn kaj ke tiuj, grandnombraj, disdonu plaĉan ombron, formovantaj la malbonaĵojn: sed la Morto la manon de l' plantisto sekigos, antaŭ ol la burĝonoj kronu miajn branĉojn.
EIDo

MONDA PREMIERO DE OPERO EN ESPERANTO EN ĈEĤA NACIA TEATRO!

La 7^{an} de aprilo okazis eksterordinara afero, monda premiero de la Esperantlingva opero "Sternenhoch" en la Nacia Teatro de Prago! Temas pri opero, kies muziko estis komponita rekte laŭ teksto en Esperanto, farita de Miroslav Malovec. Muzikon kaj libreton komponis juna komponisto Ivan Acher. La opero havis surprize grandan sukceson, ne nur de spektantoj sed ankaŭ de kantistoj, kiuj diris, ke Esperanton ili taksas kiel ideala lingvo por opero. Okazis kvin spektakloj kaj ĉiuj estis tute disvenditaj tuj post ĝia premiero, ene de unu semajno! Eĉ je du monatoj antaŭ la lasta spektaklo oni ne plu povis aĉeti biletojn.

Pavel Pavliček, gvidanto de la filmo-retejo **Verda Stacio** havis la eblon videoregistri la tutan spektaklon por arkivo. Bedaŭrinde oni rajtas publikigi nur mallongajn fragmentojn, eĉ tiujn nur post la permeso de la Teatro. Fragmento, la lasta minuto de la opero, la 24^{an} de junio 2018 en Nacia Teatro en Prago: <https://www.youtube.com/watch?v=ZfSmjGuNH1I>

Pliajn detalojn vi povas legi en la samtema afiŝo en la [fejsbuka paĝo de Ret-Info](#).

Plasto en maro kaj poluado

2a parto

Insuloj el plasto en la maroj

Plasto en la maro tiomgrade ĉeestas, ke jam oni povas paroli pri realaj plastaj insuloj. Inter Italio, Hispanio kaj Francio, en la Mediteranea maro, la plasta koncentriĝo superas eĉ tiun de la dirita "rubo-kontinento" troviĝanta en la Atlantika Oceano, kies efikoj estas katastrofaj por la mara medio.



Medio-Ligo atentigas, ke ekzistas 500 tunoj el plasto flosantaj en Mediteraneo kaj la plej dense poluataj zonoj estas tiuj de la norda maro Tireno kaj antaŭ la Insulo Elbo.

La medio estas suferanta ĝis neeltenebla punkto: oni ne plu devas deturni la okulojn aŭ meti subgrundon la kapon kiel la strutoj antaŭ tia drama situacio, kaj nepras ke en iun komunan streĉan klopodadon engaĝiĝu ĉiuj loĝantoj de la Tero.

Alia serioza problemo estas antaŭ ni: en niaj maroj naĝas fiŝoj "remburitaj" per mikroplastoj, la plej malfacile elimineblaj, kaj jam en la ventroj de tinusoj kaj spadfiŝoj estis trovitaj zorgigaj kvantoj da etaj pilkoj el restaĵoj de kremo- kaj dentopasto-tubetoj, kaj eĉ dentobrosetoj. La formiĝo de tiaj rubo-kolektiĝoj neeviteble estas kaŭzata de la marfluoj, tien kaj reen irantaj, kiuj fine koncentras en difinitaj zonoj tiajn rubaĵojn. Ĝuste pro la fakto, ke la akumulaĵoj "vojaĝas" de unu maro al alia, de unu oceano al alia, nepras alfronti la problemon sisteme, solidarece, tutterglobe kaj sinergie. Kiel aero, ankaŭ akvo senlimas, neniu barilo ekzistas, tial pli bone estas kunigi la fortojn por repurigi marojn kaj oceanojn.

Ĝis nun estis priparolite pri plastaĵoj el ia grandeco, kiaj boteloj, ujoj por manĝaĵoj aŭ kremo, tubetoj ks, sen mencii tiujn relative malgrandajn, kiel ekzemple la suĉŝalmojn, kiuj iam estis uzataj nur de knaboj, sed kiujn nun vaste utiligas ankaŭ plenkreskuloj, por ensorbi koktelojn, kokakolaĵojn kaj similajn trinkaĵojn. Ankaŭ tiuj ĉi abunde troviĝas en niaj maroj, ĉar, supozeble, tiel oni pensas: "Kian malbonaĵon povas kaŭzi tiel malmulta kvanto da plasto?" Envere, ankaŭ tiuj poluas

la maron kaj kio plej danĝeras, estas, ke ili eniĝas en la stomakon de birdoj kaj testudoj. En la mondo ĉiutage (mi substrekas: **ĉiutage!**) oni utiligas **unu miliardon da plastaj suĉŝalmoj**, el kiuj proksimume la duonon en Usono. En Eŭropo la ununura dateno venas el Londono, kie oni konsumas ĉirkaŭ 2 miliardojn jare. Konsiderindas ke multaj el tiuj ŝalmoj estas utiligataj nur unufoje ene de kelkaj minutoj, kaj poste oni ilin retrovas en la maro, kie ili restados dum centoj da jaroj, dispecigantaj en pli kaj pli etajn pecojn, ĝis ili estos englutitaj de la fiŝoj, kiujn poste - ho ve! - ni surtabligos niahejme. Statistikoj avertas, ke la kvanto da suĉŝalmoj aperas unualoke en la klasifiko pri ruboj ariĝintaj ĉe la marbordoj. Laŭ aliaj esploroj faritaj de *Strawless Ocean Movement*, estis trovita plasto en la stomakoj de ĉ. 71% de marbirdoj kaj de 30% de testudoj.

Sekve de tiuj konoj oni (*Evening Standard*) lanĉis peticion per *Change.org* por peti de la produktantoj trovi ekologiajn solvojn por redukti la invadon de tiuj iloj. Estas interese, ke la Asocio *Marevivo* (Maro-Viva) iniciatis alian agadon direktitan al mastrumantoj de trinkejoj, kafejoj, restoracioj k.a., ilin petante, ke oni ne plu ilin distribu al klientoj, ne plu aŭtomate ilin enmetu en la ujojn por trinkaĵoj (ladskatoloj, boteletoj ks), anstataŭigante - se necese - la plastajn ilojn per malkombineblaj suĉŝalmoj el papero, vitro aŭ bambuo.

Laŭ raporto farita de la Prezidanto de Maroviiva, s-ino R. Giugni, neniu konscias pri la ruinigaj efikoj - sur la maran faŭnon kaj ĝian medion - de la sistemo "uzu kaj forĵetu" rilata al produktaĵoj plastaj. Plie ŝi klarigas ke: "... la ŝalmoj eniras en la testudojn tra la naztruoj kaŭzante egajn suferojn al la bestoj...". La plano estas lanĉi kampanjon, por ke la homkutimoj ne rebatiĝu sur bestojn kaj medion, ĉefe kiam ekzistas validaj alternativoj.

Jam reagis pozitive Anglio, kie trinkejoj kaj restoracioj rezignis pri la plastaj ŝalmoj kaj nun disponigas tiujn ekologiajn. Pro la volo de Reĝino Elizabeto tiuj iloj estis elpelitaj el ĉiuj reĝaj propretoj, el la internaj restoracioj de Buckingham Palaco, Kastelo de Windsor kaj Palaco Holyroodhouse, kaj same el la Naturhistoria Londona Muzeo kaj en la skota Parlaamentejo. Eĉ pli: jam la brita estraro estas pristudenta leĝproponon por ilin malpermesi en la tuta lando. Brave kaj gratulojn!

Ankaŭ Usono pretas ilin elimini, komencante en Malibu (Kalifornio), Seattle kaj Florido. En Skotlando ili estos forigitaj ekde 2019, en Taivano ekde 2030. Kiam en Italio?

Sekvos 3^a parto venontbultene



Spikumajoj

Certe ĉiuj el ni scias, kiu estis kaj kion eltrovis Rudolf Diesel [Dizel], sed mi vetas, ke multaj estas informitaj pri lia esperantisteco.

Mia 16-jara nepino Matilde, kiu bone konas mian "manion" pri Esperanto, sendis al mi mesaĝon, por informi min pri interesaĵo en Vikipedio rilata al R. Diesel.

Kompreneble mi tuj sekvis ŝian konsilon, kaj jen la rezulto:

Rudolf Christian Karl Diesel (1858-1913) estis germana inĝeniero, inventisto de *motoro kun interna brulado, en kiu la karburado, injektita en forte densigitan aeron, spontane ekbrulas* (nPIV). Li estis ankaŭ lingvosciencisto.



Filo de germanaj gepatroj, post la eksplodo de la Franca-Germana Milito (1870) kun ili li translokiĝis al Anglio. Sian studadon li kompletigis unue en Aŭgsburgo, la patra naskiĝurbo, kaj poste en Munkeno, kie li vizitis la Teknikan Altlernejon ĝis akiro de inĝeniera diplomo. En 1892 li ricevis la germanan patenton pro sia invento.

Sed en lia patrolando oni komencis persekuti lin, asertante, ke li ne meritas la gloron, ke la invento prezentas nenion novan. R. Diesel ege suferis pro tiuj falsaj akuzoj.

Li mortis je nur 55 jaroj, en tragikaj kaj misteraj cirkonstancoj: kiel pasaĝero, li estis iranta per vaporŝipo al Londono. Dum iu sep-

tembra mateno oni ne plu trovis lin en la kajuto: li senspure malaperis.

Tiel finiĝis la vivo de talenta inventisto, kiun mortĉasis fiaferistoj kaj enviantoj. Sed lia kreita motoro ekzistas ankoraŭ nun, en daŭra kaj konstanta evoluigo.

Kaj nun kelkaj liaj frazoj, atestantaj lian konatiĝon kun la internacia lingvo. [el 'Das Esperanto ein Kulturfaktor', 1913]

"De multaj jaroj mi mem interesiĝas pri Esperanto. Tiu ĉi internacia helplingvo plenumas bazajn kondiĉojn, por ke akceptu ĝin plej multaj popoloj kaj por ke ĝi plue ekzistadu en natura ligo kun la ĉefaj gvidantaj lingvoj en la genia simpleco kaj logiko de sia strukturo.

Ĉi tiun lingvon mi pritraktas el vidpunkto de inĝeniero, kies klopodo estas direktita al ŝparo de energio... La celo de Esperanto estas ŝpari tempon, energion, laboron, monon, kaj plirapidigi, plisimpligi la internaciajn rilatojn.

De tiu vidpunkto estas malfacile kompreni kontraŭstarojn, kiaj ankoraŭ aperas kontraŭ enkonduko de afero tiel utila por la homaro. Mi opinias enkondukon de Esperanto kiel necesegan bezonon por la paco kaj kulturo."

ED



Poŝtmarko eldonita de Deutschen Bundespost en 1958 okaze de Diesel-a 100^a naskiĝdatreveno.

Fontoj: Vikipedio; <http://www.esperanto.mv.ru/Arkivoj/Vivstrategio/Diesel.html> - G. E. Kotelnikov

Kiu serĉas, tiu trovas.

Mia preferata proverbo ĝi estas. Jen kion mi trovis antaŭnelonge: vidu la flankan bildon de nia LLZ. Tian neniam antaŭe mi estis vidinta, do sekve, haste mi klopodis ĝin akiri. Dirite, farite: Fortuno min favoris kaj nun ĝi kuŝas kun aliaj E-kartoj, eldonitaj en la sama jaro: 1922.


Klare legeblas la nomo de la grafikisto ĝin desegninta: **Stanislav Kulhánek**. Gravus nun

trovi ian informon pri li kaj pri lia ebla rilato al Esperanto.

Li naskiĝis en Kladno (Ĉeĥio) en 1885 kaj tie mortis en 1970. Eklektika persono li estis: pedagogo, artfotografisto, pentristo kaj kreema grafik-artisto. En diversaj kampoj li eminentis. Post universitata diplomiĝo en Artoj kaj Mezioj, dum jaroj li klopodis viziti la plej gravajn artgaleriojn en Eŭropo por akiri novajn kon-

ojn. Krom labori kiel profesoro pri desegno kaj priskriba geometrio, li sin dediĉis al grafiko, ĝenerale: al libra grafiko, aplikataj artoj, portretoj kaj muta naturo.

Tre interesaj estas aparte liaj ekslibrisoj, ĉiam tre originalaj, fantazioplenaj, kiuj estis influataj ne nur de la novaj artistaj tendencoj sed ankaŭ de la tiama politika situacio. En tiu kampo li estis unu el la plej aprezataj artistoj en la mondo, utiliganta la gravurad-teknikon. Ankaŭ nuntempe liaj ekslibrisoj estas tre interesaj objektoj por kolektantoj. Pluraj el ili prezentis portretojn de famuloj, inter kiuj Mikaelanĝelo, Mozart, Mánes kaj - evidente - ankaŭ nia Majstro. Sur la malantaŭo de la karto ne estas skribite, kiu komisiis la portreton kaj ĝin eldonis. Bedaŭrinde!



Tra la verda mondo!

EL Gazetaraj Komunikoj de UEA: N-ro 733 - 2018-05-02

Rob MOERBEEK, honora membro de UEA, fariĝis Kavaliro de la nederlanda reĝa Ordeno de Oranje-Nassau, pro sia agado por la E-movado en Nederlando kaj tutmonde, sindediĉa laborado favore al handikapitoj, precipe blinduloj kaj malfortevidantoj, siaj redaktista, korektista kaj instrua aktivado. La urbestro de la urbo, en kiu Rob Moerbeek loĝas, Beverwijk, speciale venis al Roterdamo por enmanigi la ordenon kaj gratuli la samurbanon dum la Malferma Tago de UEA, la 28^{an} de aprilo 2018 (vidu videon: <https://www.youtube.com/watch?v=2viNCD2snwg>).



Dum 32 jaroj li laboris kiel oficisto en la UEA-CO, zorgante pri la ekspedofako kaj provlegado de "Esperanto" kaj aliaj eldonaĵoj. Krome li okupiĝis pri la Biblioteko Hodler kaj la CO-arkivo. De 1978 ĝis 1998 li estis privatdocento pri Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo. Post sia emeritiĝo en 2001, li laboras volontule en la Centra Oficejo. Ekde 2001 li reprezentas la Ligon Internacian de Blindaj Esperantistoj en la Komitato de UEA. Li agadas ankaŭ pri nefumismo en la fakasocio TADEN (Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj). En 2000 R. Moerbeek ricevis la Premion Deguĉi pro la longtempa agado por triamondaj esperantistoj kaj handikapitoj, precipe blinduloj. En 2011 li iĝis Honora Membro de UEA kaj en 2014 de ILEI.

EL Gazetaraj Komunikoj de UEA: N-ro 737 - 2018-06-13

KIEL ENMOVADIGI

LA ESPERANTO-LERNANTOJN DE DUOLINGVO?

Pli ol 1,7 milionoj da homoj eklernis Esperanton per **Duolingo**. Sed kie estas tiuj lernantoj? Multaj el ili eble rezignas pri la lernado pro multaj kaŭzoj, interalie, ĉar ili ne sukcesis starigi personan kontakton kaj amikecan rilaton kun esperantistoj en siaj loĝurboj.

Pro tio UEA fariĝis partnero de Duolingo. UEA helpas trovi evento-gastigantojn, kiuj jam bone konas Esperanton, kaj Duolingo prizorgos invitojn al tiaj lokaj eventoj por lernantoj, kiuj iom progresis en la Esperanto-kurso.

Gastigantoj estas volontuloj, kiuj organizas interesajn, agrablajn eventojn, kie Esperanto-lernantoj el ĉiuj niveloj lernas kaj amuziĝas kune. La eventoj povas esti diversspecaj, ekzemple babiladaj rondoj, studgrupoj, ludaj aŭ muzikaj renkontiĝoj en via loka klubo aŭ kafejoj, aŭ promenadoj en urboj aŭ en la naturo.

Ni jam komencis traduki la evento-retejon de Duolingo al Esperanto, por ke ĉiuj esperantistoj povu gastigi eventojn, diskonigi ilin per Duolingo kaj akcepti novajn lernantojn. En ĉi tiu unua, prova fazo ni precipe serĉas volontulojn, kiuj krom Esperanto regas la anglan aŭ la hispanan, la du nunajn kurslingvojn.

Se allogas vin la ideo organizi eventojn kaj gastigi novajn Esperanto-lernantojn per Duolingo, bonvolu kontaktiĝi kun Emilio Cid cid.emilio@gmail.com.



INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

1-a ESPERANTO-PILGRIMADO AL FATIMO

la 1-an de aŭgusto 2018

**Sankta meso en Esperanto
Kapelo de la Aperoj je la 10.30h**

Informoj, aliĝoj: ikue.reto@gmail.com

Noto:
Sacerdotoj kiuj deziras kuncelebri la meson, nepre anticipe sendu la kopion de "celebret" al la retadreso: ikue.reto@gmail.com



Tre detalajn informojn vi trovos ĉe:

goo.gl/LdV1fK

Post atenta legado tuj plenigu la retan aliĝilon


<https://goo.gl/forms/X3N4zLhEN2Shczeh2>

#esperantofatimo #ikuealfatimo



Bonvenon en la ttt-ejo de Arthur Troop Pipes and Drums (sakŝalmoj kaj tamburoj)

Temas pri bando el policianoj kaj civilaj muzikistoj, honore dediĉita al Arthur Troop, la fondinto de la Internacia Policista Asocio (IPA) en 1950, post longaj kaj diskutoplenaj intertraktadoj kun la Policista Federacio. Li multon laboris por povi konkretigi sian deziron, nome kunligi la policianojn el la tuta mondo. Kiam finfine la asocio estis starigita, li mem desegnis la emblemon kaj proponis la devizon, SERVO PER AMIKECO, unuanime akceptita de ĉiuj.




En 2008 pluraj muzikamantoj fondis grupon kaj nun ili prezentas siajn spektaklojn dum pluraj eventoj, en- kaj eksterlande. Ĉefelemento estas la skota sakŝalmo, akompanata de diverstipaj perkutinstrumentoj. La muzikgrupanoj havas, kiel uniformojn, la tartajn kiltojn, tipajn de la sekcio IPA Grandbritujo kaj Skotlando. Ankaŭ ili elektis Esperanton por sia devizo: Muziki

per Amikeco.

Jen ilia deklaro: "MUZIKI PER AMIKECO signifas ludi muzikon danke al kaj per amikeco, kio donas pluan plezuron al ni kaj al niaj spektantoj."

Dimanĉon la 9^{an} de septembro 2018 Festo de Amikeco sur Monto Forno

Sur la Trilanda Pinto, *Dreiländereck*, renkontiĝos laŭtradicie la esperantistoj de Aŭstrio, Slovenio kaj Italio, kaj ankaŭ el aliaj landoj.



Triestanoj kaj italoj, ne maltrafu ĉi okazon pasigi gajan dimanĉon en esperantista kaj internacia etoso.

Rendevuo ĉe la surpinta simbolo ekde la 12^a horo. Tie bonvenigos nin ĉiujn Martin Stuppniĝ!

Aforismo

Vortoj ne estas kreataj de akademianoj en Akademioj, sed de ordinaruloj. La aŭtoroj de vortaroj kaptas ilin kiam jam tro malfruas kaj ilin mumiigas en alfabeto ordo, multokaze kiam ili ne plu havas la saman signifon celitan de la aŭtoro.

Gabriel García Márquez

Fermo de la asocia sidejo: julie kaj aŭguste!


Aktiveco en TEA-sidejo ree komenciĝos **vendredon la 7^{an} de septembro je la 19^a h.**

Ni atendas vin multnombraj, pretaj ekagadi por la prospero de nia TEA.

En preparo grava aranĝo en 2019: ni bezonas vian helpon, sed intertempe...




Bonan someran tempon kaj ĝis septembro!



TRADICIA SOMERA FESTO ĉe ANITA

Sabaton la 21^{an} de julio,
ekde la 17^a horo! Ni gaje kunfestadu!

Ĉiuj estas varme invititaj!



Se Adamo kaj Eva estintus azianoj...

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste

Kunventagoj: marde 18-20; vendrede 19-21

Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936

Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439

Reto: esperantotrieste@gmail.com; nored@tiscali.it

Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org; www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org